Vi lernos, kaj praktikos

Je kioma horo? => Je la dua.

Kiam? =>

lunde	matene
marde	posttagmeze
merkrede,	vespere
ĵaŭde	tage
vendrede	nokte
sabate	frue, malfrue
dimanĉe	

1 Ĉu vi vekiĝas je la tria kutime?
2 Je kioma horo vi vekiĝas?
3 Ĉu vi matenmanĝas je la dekdua?
4 Je kioma horo vi matenmanĝas?

5 Kiam vi vekiĝas kaj matenmanĝas?
6 Je kioma horo vi matenmanĝas dimanĉe, kaj je kioma horo vi matenmanĝas lunde?
7 Ĉu vi tagmanĝas je la sepa?
8 Kiam vi tagmanĝas?

9 Kion vi faras je la tria posttagmeze (= 15:00)?
10 Je kiomaj horoj vi matenmanĝas kaj tagmanĝas?
11 Je kioma horo komenciĝas nia leciono de Esperanto?
12 Je kioma horo nia leciono finiĝas?

13 Je kiomaj horoj komenciĝas kaj finiĝas nia leciono de Esperanto?
14 Ĉu nia kurso de Esperanto okazas merkrede?
15 Kiam ĝi okazas?
16 Ĉu vi venas al nia kurso matene?
17 Kiam ni venas al nia kurso de Esperanto? Matene, posttagmeze, aŭ vespere?

18 Ĉu vi vespermanĝas antaŭ la leciono de Esperanto aŭ post ĝi?
19 Je kioma horo vi vespermanĝas?
20 Ĉu vi enlitiĝas je la oka vespere?
21 Je kioma horo vi kutime enlitiĝas?

22 Kiam vi enlitiĝas vendrede, sabate, kaj dimanĉe?
23 Ĉu vi ekdormas frue, kaj vekiĝas malfrue?
24 Bonvolu reuzi la demandoliston alifoje. Dankon!